"Ovojn mi certe gustumis" diris Alicio (ŝi estis ja tre verdira infano) sed la knabinetoj egale kun la serpentoj ofte manĝas ovojn."

"Tion mi ne kredas" diris la Kolombo, "sed, se tiel estas, ĉiu knabineto sekve estas iuspeca serpento. Jen ĉio!"

Tio ĉi estis por Alicio tute nova ideo; do ŝi unu, du momentojn staris silente, kaj la Kolombo profitis la okazon por aldiri:

"Mi tre bone scias ke vi nuntempe serĉas ovojn, do al mi ne grave estas ĉu knabineto vi estas aŭ serpento!"

"Tamen al *mi* estas tre grave," respondis Alicio rapide. "Fakte, mi *ne* serĉas ovojn; kaj se mi serĉus, mi ne volus la viajn, ĉar nur la kuiritajn ovojn mi ŝatas."

"Nu, do, vi iru for!" diris la Kolombo malafable, kaj retrankviliĝis sur sia nesto.

Alicio kurbigis sin kiel eble plej bone inter la arboj, sed ŝia kolo ofte implikiĝis inter la branĉoj kaj kelkfoje ŝi devis malligi ĝin. Post kelka tempo memorante ke ŝi ankoraŭ havas en la manoj la fungopecetojn, ŝi klopodadis tre zorge, mordetante jen unu jen la alian, kaj pro tio proporcie kreskis kaj malkreskis, ĝis fine ŝi sukcesis rehavi la propran kutiman al ŝi altecon.

Jam tiel longe ŝi havis diversajn neproprajn altecojn ke unue ŝi sentis sin stranga, rehavante



la propran. Tamen post kelk
alkutimiĝis ĝin, kaj komencis ku
jene:—

"Nu, jam la duonon de mia
elfaris. Kiel konfuzigaj estis tiuj
eĉ ne povis esti certa en ĉiu m
fariĝos en la sekvanta. Sed nu
propran altecon, kaj restas nur —
belan ĝardenon. Kiamaniere mi
pri tio?"

Dirante tion, ŝi alvenis, neaten
senarba terpeco, kun (en la me
granda dometo, kies alteco estis
metro.

"Kiuj ajn loĝas tie," pensis A
konvenas ke mi renkontu ilin hav
grandecon, mi ja morttimigus ilin

Do ŝi denove mordetis la de
pecon, kaj ne kuraĝis alproksimiĝ
ĝis ŝi estis nur dudek kelke d
alta.



LEWIS CARROLL *La Aventuroj de Alicio en Mirlando* Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEI